



Perigorda Esperantista Grupo

Prelegoj, ekspozicioj, esperanto-kursoj...

17, lotissement de l'aérodrome, FR-24330 BASSILLAC Tel.: (33) (0)5 53 54 49 71

Retadreso: esperantoperigord@yahoo.fr

Retejo: <http://esperanto-gep.asso.fr>

(Esperantlingva versio; ekzistas franclingva versio de tiu ĉi dokumento adaptita al aĉeto de Francujo)

La sekreto de la arbaro de Lascaux



Septembron 1940, kvar junuloj malkovris la faman groton de Lascaux

Laŭ la rekta atesto kaj la aprobo de tiuj ĉi **Thierry Félix**, la scenaristo, kaj **Philippe Bigotto**, la desegnisto, entreprenis la rakonton de la plej bela historio de la prahistorio.

La desegnaro unue nigra kaj blanka, kaj poste riĉigita per koloroj por redoni la belegecon de la prahistoriaj pentraĵoj, nin lokas okule en la etoson de la epoko.

Miksita kun la scenaro, novaperintaj originaj dokumentoj aldonas didaktikan dimension al la plezuro de la legado.

Oni legas tiun albumon kiel aventuron, kies historia ĝusteco ebligas, ke oni konsideru ĝin kiel referencon. Oni ne povus plej bone saluti tiun eksterordinaran malkovron, en kiu realo superis fikcion tigrade, ke ĝi fariĝis bonega scenaro de bildrakonto!

Okaze de la 70a datreveno de la malkovro de la groto, la **Perigorda Esperantista Grupo** aranĝis tradukadon de tiu albumo al Esperanto. Tiu tradukado estas farita de teamo el Perigordo (aŭ Dordonjo, la franca departemento kie situas Lascaux) kaj, por ke ĝi estu kiel eble plej bonkvalita, reviziita de Marie-France Condé-Rey (Ĉarenta, Francujo), Russ Williams (Polujo) kaj Imre Hegedűs (Hungarujo).

Viavice malkovru la sekreton de la arbaro de Lascaux...

Ni bezonas vian helpon por disvendi tiun albumon

La publika vendoprezio de la albumoj estas po 13 eŭroj + partopreno po 4 eŭroj al la pakaĵ- kaj send-kostoj, krom okaze de senpaga liverado de la esperantista reto. Ni konsentas pri 10 %-rabato el la publika prezo al asocioj aŭ grupoj, kiuj aĉetas almenaŭ 3 ekzemplerojn. Danke al akordo inter la eldonisto de la originala franclingva versio kaj ni, ni disvendos tiun lastan samkondiĉe.

Por eviti tro grandan financan riskon, ni elektis limigi la eldonnombron al 1000 ekzempleroj, sed tiu elekto plialtigis la fabrikokoston por albumo. Konsekvence la vendo pere de librovendisto, kiu ĝenerale eltiras 30 %, ne estos profitodona; ĝi tamen ne estas tute evitinda ĉar la ĉeesto de albumoj en vendejo-bretaro konsistigas mem reklamon por esperanto.

Por reekhavi, dum pluraj jaroj, nian unuan elspezon, ni devos vendi preskaŭ ĉiujn 1000 ekzemplerojn ĉefe per rekta vendo al personoj kaj grupoj (regionaj, naciaj...).

Cetere, ni uzos helpon de la Ĝenerala Konsilio de Dordonjo por nin ŝarĝi de la sendokostoj ĝis plej malriĉaj landoj (B-zono laŭ la klasifikado de UEA).

Ni do bezonas vian helpon por disvendi tiun albumon.

Respondante ĉi-sube vi povas aĉeti albumojn, donaci monon kaj/aŭ proponi vian helpon...

Ĉu vi ŝatus traduki tiun albumon al via gepatra lingvo?

Tiu tradukado, kompreneble el la esperantlingva versio, konkrete montrus al ĉiuj la rolon, kiun esperanto povus ludi kiel ponto-lingvo, des pli se via gepatra lingvo estas vaste uzata. Sed se via gepatra lingvo estas minacata aŭ ne vaste uzata, tio povus esti bona ideo por konatigi ĝin.

Tiacele nia grupo pretas tute senpage helpi vin ekhavi la necesajn dosierojn kaj diskuti kun la verkistoj de la franca originala versio, kaj kun ilia eldonisto « Dolmen Editions » (10, rue Xavier Vial, FR-24200 SARLAT, dolmen.editions@wanadoo.fr), pri la konkretaj, teknikaj kaj mona flankoj.

Do ne hezitu kontakti nian grupon kaj/aŭ la eldoniston pri tio.

✂

Mendilo

Bonvolu noti, ke ni disvendos samkondiĉe la esperantlingvajn kaj franclingvajn albumojn.

La kovrilo estas « kudrita kvadrata dorso » same kiel, tiu de la originala versio, tradicia ĉe belaj albumoj.

Prezo : po 13 eŭroj (11,70 eŭroj por asocioj aŭ grupoj, ekde 3 ekzempleroj) se liverado per senpaga esperantista reto eblas (bonvolu kontroli, ni petas, ke tio eblas) aŭ se vi loĝas en B-zono, laŭ la UEA-klasifikado.
po 17 eŭroj (15,70 por grupoj, ekde 3 ekz.), inkluantaj partoprenon por pakaĵ- kaj send-kostoj per poŝto.

NOMO: Grupo (eventuala):

Poŝtadreso:

Telefono: Retadreso:

Mi deziras : aĉeti esperantlingvajn albumo(j)n sumo de eŭroj
 aĉeti franclingvajn albumo(j)n sumo de eŭroj
 donaci monon por subteni la projekton sumo de eŭroj
 pagi (vidu la rimedojn ĉi-sube) totalan sumon de eŭroj
 akcepti, kiel deponon, esperantlingva(j)n albumo(j)n kaj franclingva(j)n
 proponi aŭ partopreni tradukadon al la
 helpi vin alimaniere. Mi proponas

..... Dato: Subskribo:

Ni proponos, ke vi pagu per ĝiro al nia banko-konto, kiun ni sciigos al vi en nia respondo, aŭ rete per kreditkarto kaj « Paypal » (tiukaze aldonante 5 % pro specialaj kostoj). Do bonvolu respondi retmesaĝe al esperantoperigord@yahoo.fr aŭ sendi tiun mendilon per letero al Perigorda Esperantista Grupo, 17, lotissement de l'aérodrome, FR-24330 BASSILLAC